# Gvidlinioj de Laborplano de ILEI

## 1: Internaj kaj rutinaj taskoj

1.1) Prizorgado de la vivo de ILEI de la administra vidpunkto

1.2) Renovigado de la retejo de ILEI

1.3) Dokumentado de la renovigado de la retejo de ILEI

1.4) Daŭra ĝisdatigo de la paĝo pri IPR

1.5) Regula prizorgado de la retejo de ILEI

~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~

## 2: Eldonaĵoj, retaĵoj, kunsidoj kaj interrilatoj

2.1) Regula publikado de IPR

2.2) Regula publikado de JA

2.3) Daŭre verki trimonatajn raportojn

2.4) Ĉiujara okazigado de la Komuna Legado okaze de la Tago de la Libro (15-an de decembro)

2.5) Realigado de libro pri Premio La Torre, se eble kun la ISBN-kodo de ILEI

2.6) Publikigi la librojn de la Aktoj de la ILEI-simpozioj, se eble kun la ISBN-kodoj de ILEI

2.7) Publikigi aliajn librojn pri ILEI kaj/aŭ edukado, se eble kun la ISBN-kodoj de ILEI

2.8) Teni bonajn rilatojn kun UEA

2.9) Teni bonajn rilatojn kun TEJO

2.10) Daŭre okazigi ĉiumonatajn renkontiĝojn de universitatanoj, kiuj jam de jaroj okazas kiel "Kunpens(ig)ado pri Esperanto en Universitatoj"

2.11) Daŭre okazigi ILEI-forumojn precipe pri "Esperanto en Lernejoj"
~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~

2.12) Prizorgado de la jutuba kanalo de ILEI nutrante ĝin i.a. per la registraĵoj de la kursoj de la projekto EToSo (Esperenato-kursaro Tibor Sekelj).

2.13) Prizorgado de la aliaj retaj sociaj komunikiloj de ILEI (Kiel Telegramo kaj Ŭacapo).

2.14) Daŭrigado kaj perfektigado de la projekto "Homa Ĉeno"

2.15) Daŭrigado de la video-projekto "Vojagxo al la Oriento" kaj ĝenerale de la kunlaboro kun MA-GA Filmoj

2.16) Daŭrigi rilatojn kun aliaj enmovadaj kaj ekstermovadaj organizoj, ekzemple kiel la Esperanto-Muzeo de la Universitato de Zaozhuang aŭ la Ĉina Komunikila Grupo.

~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~

## 3: Kongresoj kaj kongresaĵoj

3.1) Regula okazigado de ILEI-kongresoj ĉiujare en alia lando

3.2) Regula okazigado de ILEI-simpozioj laŭeble kune kun ILEI-kongresoj

3.3) Instruista trejnado dum la kongreso ktp.

3.4) Dezirinda kaj regula okazigado de la Premio La Torre

~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~

## 4: Revuoj kaj ekzamenoj

4.1) Konservi la samajn aperritmon kaj paĝnombron de IPR kaj klopodi ĝiseble ne altigi ĝian prezon, eĉ se necesas subteni ĝin per niaj rimedoj, ĉar ĝi estas nia organo, kaj ĉia nedezirata ŝanĝo pri ĝi, povas konduki al malpliiĝo de la abonantoj/membroj. Similan aliron sekvi ankaŭ por Juna Amiko laŭeble, se ĝi ne estos tro deficita.

4.2) Pripenso pri la bezonoj de lernejaj instruistoj (ĉu membroj de ILEI, ĉu ne); ĉu Juna Amiko sufiĉas?; kiaj servoj de ILEI helpus ilin?

4.3) Aktive serĉi homojn/firmaojn, kiuj volas pagante varbadi en la revuoj de ILEI.

4.4) Ekzamenoj de ILEI/UEA

~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~
~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~

## 5: Instruado

5.1) Daŭra emfazo pri la projekto “Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejano en la tuta mondo”

5.2) Kadre de la projekto “Esperanto-kursaro Tibor Sekelj" (EToSo) starigi novajn ret-kursojn en diversaj landoj/lingvoj, precipe en tiun, en kiuj nun ne okazas retaj kursoj de iu ajn tipo

5.3) Instigi instruadon en publikaj lernejoj per projektoj kiel "30 Oraj Horoj" en Italio, kaj bone dokumenti ilin per libroj, videoj, intervjuoj kaj artikoloj por faciligi ilian imitadon en aliaj landoj; tio inkluzivas tradukojn al aliaj lingvoj de la libro “Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj”

5.4) Prezenti Esperanton al NeRegistaraj Organozoj (NROj), precipe tiuj , kiuj aktivas por paco, ter-savado, lingvaj rajtoj kaj minoritatoj

5.5) Batali kontraŭ analfabeteco per instruado de Esperanto kiel la plej facila lingvo el ĉiuj etnaj lingvoj

5.6) Sendado de lernomaterialoj (kiel lernolibroj kaj ciferecaj fontoj) al la bezonantaj landoj ekz-e en Afriko kaj Azio.

5.7) Vidi kun Maja Tislar, ĉu eblas relanĉi la Multlingvan Akcelilon

~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~

## 6: Eksteraj rilatoj

6.1) Sendi observantojn al UNESKO por videbligi niajn agadojn tie kaj klopodi akiri oficialan kunlaboran rilaton. Daŭre videbligi la projektojn jam plurlingve prezentitajn por la pasinta premio Hamdan (Kungfua Kunikleto, 30 Oraj Horoj, Edukado.net)

6.2) Daŭra partoprenado en diversaj edukadaj konkursoj, kiel la premio Hamdam pri edukado

6.3) Daŭre ĝisdatigi varbadajn materialojn pri ILEI por UNESKO, UN ktp. precipe por efike prezenti niajn projektojn; tio inkluzivas aldoni projektojn al la lingvaj paĝoj de la retejo de ILEI

6.4) Teni bonajn rilatojn kun institucioj kiel FIPLV (Fédération Internationale des Professeurs de Langues Vivantes)

~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~~